BIBLIOTHÈQUE LA CHAUX-DE-FONDS ETN

Etnismo

N-RO 24 INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ 24.07.80



Pli kaj pli da minacataj etnoj insistas pri la nepreco de sialingva televido.

La INSTITUTO DE OKCITANAJ STUDOJ (I.O.S.), la 19-an de januaro 198o, lançis la kampanjon "La okcitana en la televido", kaj intertempe miloj da homoj subskribis peticion kiu pledas por

- okcitanlingvaj informoj en la programo "Regionaj Aktualaĵoj" (ĉiutaga);
- unuhora programo (ĉiusemajna) pri aktualaĵoj;
- ĉiusemajna kultura programo vespera pri okcitana poezio, teatro, kantado k.s. (evidente, en la okcitana lingvo);
- kursoj pri la okcitana en la lerneja televido.

Tiu ĉi-apuda virino evidente ĝojegas pri la venko de la neo en la referendumo de la 2o-a de majo 198o en la kanada provinco Kebekio. La Kebekisma Partio de ĉefministro René Lévesque akiris nur 4o,5 % por sia projekto de intertraktado kun la federacia registaro de Pierre Elliott Trudeau (kebeki-devena) koncerne eventualan suverenecon de Kebekio (tamen ekonomie ligita al Kanado). El la 6,2 milionoj da kebekianoj rajtis voĉdoni proksimume 4,3 milionoj kaj fakte partoprenis la baloton 83 %, t.e. 3,6 milionoj. La enloĝantoj de Kebekio estas je 8o % franc-devenaj, dum sama procentaĵo estas angla-devena en la resto de la kanadaj provincoj. En Kanado vivas 23,5 milionoj da homoj, el kiuj proksimume 3oo.ooo estas indianoj kaj 18.ooo eskimoj.

Heribert Barrera (ĉi-apuda foto), estro de la Respublikana Maldekstro de Katalunio kaj Teritoria Sekretario, por Hispanio, de la Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj, prezidas la parlamenton de la "Generalitat". (Vidu kelkajn detalojn en paĝoj 19 kaj 2o.)

Krome, vi povos legi pri: P I K A R D O J ..... p. 3
A Ĉ E O J ..... p. 8 S A M E O J 1o
C I G A N O J ..... p. 13 V A S K O J ..... p. 16

KONCIZE EL.....

ALĜERO. Kiam la 1o-an de marto 198o la alĝeriaj aŭtoritatoj malpermesis al la verkisto Mulud Mameri prelegi en la universitato de Tizi-Uzu (mezvoje inter Alĝero kaj Bejaia) pri "Antikva kabila poezio", eksplodis la longe amasiĝinta kolero de la kabilaj studentoj. Ne estas troigo nomi tion ribelo. La kabiloj, nuntempe proksimume 3,5 milionoj en 6.ooo kvkm, posedas jam ampleksajn spertojn pri ribeloj: Ili estis inter la liberigaj militistoj kontraŭ Francio por krei suverenan Alĝerion, kaj iliaj "kuzoj" en Maroko, dum jardekoj, batalis kontraŭ hispanoj kaj francoj. La promesoj de la alĝeria gvidantaro koncerne samrajtecon kulturan la kabiloj ne forgesis. Ili postulas ke ilia lingvo, unu el la brancoj de la berberaj lingvoj (proksimume 6 milionoj da parolantoj en Maŭritanio, Sahaŭrio, Maroko, Alĝerio, Tunizio, Libio kaj Egiptio), estu la dua oficiala lingvo de Alĝerio. Sed la registara programo estas precize mala: Ĝi celas kompletan arabigon de instruado kaj administrado ĝis 1982 por povi deklari la araban plej malfrue en 1985 "nacia lingvo" de Alĝerio.

MAĤAČKALO. En la Dagestana Aŭtonoma Soveta Socialisma Respubliko (parto de la monstra Rusa Soveta Federacia Socialisma Respubliko!) kaj en la Azerbajĝana SSR vivas apenaŭ duon-miliono da lezgoj, kiujn jam delonge kaj simile kiel aliajn malgrandajn etnojn en Sovetunio minacadas "natura" asimiligo ĉu inter rusoj (kio plejprobablas), ĉu inter avaroj, la plej granda grupo en la Dagestana ASSR, ĉu inter azerbajĝananoj. - En aprilo 198o la polico de Ugoldar avertis la lezgan verkiston Iskander Kaziev fini sian "propagandon", kiu konsistas, interalie, el atentigo pri la fakto ke Sovetunio neniel helpas la relative malmultnombrajn etnojn de Dagestano konservi sian identecon, sed, tute male, akcelas la kunfandigon de pluraj etnoj en pli grandajn unuojn. Kaziev memorigis ke en Dagestano ekzistis en 1915 ankoraŭ 81 diversaj etnoj, en 1935 nur 32 kaj ne pli ol 11 en 1959. La sama aŭtoro ripete proponis al la tutŝtata parlamento la kreon de aŭtonoma distrikto por la lezgoj, vane. Se Kaziev estus escepto! Dum la pasintaj dek jaroj Sovetunio persekutis aron da lezgoj: jugisto estis kondamnita je 15-jara laborado en koncentrejo; milica kapitano devis pasigi kelkajn jarojn en koncentrejo; jur-konsilisto, filologoj, kuracisto estis kondamnitaj surbaze de pretekstoj, kaj iuj el ili estas ankoraŭ nun "kuracataj" en psikiatraj hospitaloj.

STRASBURGO. La plej altranga funkciulo de edukado en Alzaco, rektoro Magnin, deklaris en intervjuo, farita de la gazeto "Nouvel Alsacien - Der Elsässer" dum majo 198o, ke en Alzaco oni minimume disponu pri du lingvoj, la franca kaj la germana. Li opinias ke plej konvenas, por savi la dialekton alzacan, bone scipovi la germanan, kaj li anoncis ke oni planas sisteman instruadon de la germana al estontaj instruistoj. Tamen, li avertis ke premiso de la lerneja instruado de la germana estas ke, unue, la alzacanoj deziras ĝin kaj, due, ke la instruistoj pretas efektivigi ĝin. - La asocio "Cercle René Schickele-Kreis" komentas, en sia presbulteno de julio 198o, ke la principo de fakultativeco flanke de la instruistoj estas neakceptebla, kaj ke oni postulas devigan studadon pri la germana fare de ĉiuj estontaj instruistoj. Same tiu ĉi asocio atentigas ke necesas sisteme praktiki la dialekton en la infanvartejoj, t.e. ĉiutage minimume dum unu horo en plej diversaj formoj de lingva esprimado.

Rostock. En Germana Demokratia Respubliko (GDR), simile kiel en Federacia Respubliko Germanio (FRG), konstateblas klara tendenco por refortigo de la platdiĉa lingvo. En la popoluniversitatoj de Rostock kaj Teterow (ambaŭ en Meklenburgio, norda GDR), en 1978 kaj 1979 ekfunkciis vervaj kursoj pri la regiona lingvo, kiujn partoprenas homoj el diversaj socitavoloj. Oni ankaŭ studas sian historion, folkloron kaj literaturon.



xxxxx ŝtatlimo ——— limo inter francaj departementoj respektive belgaj provincoj

••••• limo de la pikarda lingvo-regiono

IGNORATA ETNO:

LA PIKARDOJ

Rigardu mapon de la eŭropaj etnoj, tian kian produktas ĉiuj etnismaj movadoj: Vi vidos ke la tuta norda duono de la franca ŝtato estas giganta blanka makulo, kvazaŭ dezerto, trastrekita per la mencio "franca lingvo" aŭ kelkfoje "oil-lingvo". Tio ŝajne implicas ke oil-lingvo egalas al franca lingvo. Mi asertas male ke ekzistas tuta fasko da oil-lingvoj, inter kiuj la franca estas nur unu (parolata en malvasta regiono ĉirkaŭ Parizo, t.e. en la regiono nomata "Ile-de-France"); aliaj oil-lingvoj estas ekzemple la valona, parolata en la sudo de Belgio (1), la normanda, kaj la pikarda, pri kiu ni nun okupiĝos.

Kutima opinio estas ke tiuj valona, normanda, pikarda kaj aliaj oil-aĵoj

estas dialektoj de la franca lingvo. Necesus klare difini kio estas dialekto kaj kio estas lingvo. Mi starigas la demandon: Ĉu "dialekto" vere havas lingvistikan sencon aŭ ĉu ĝi estas oportuna etikedo por pravigi la subpremadon de iuj lingvoj? La okcitana kaj la eŭskera estis iam nomataj "dialektoj"; estas strange ke nun la okcitanoj kaj eŭskeroj senpripense reuzas tiun vorton koncerne la pikardan aŭ la valonan. Kelkaj difinas lingvon kaj dialekton tiel:

- La parolantoj de du malsamaj lingvoj ne povas interkompreniĝi sen antaŭa studado.
- La parolantoj de dialektoj de la sama lingvo povas interkompreniĝi.

Ankaŭ tiu difino estas kritikinda: Inter malsamaj slavaj lingvoj interkompreniĝo ofte eblas. Tamen, laŭ ĝi, la pikarda, valona kaj franca estas tri apartaj lingvoj, ĉar interkompreniĝo inter ili plej ofte ne eblas, malgraŭ kelkaj komunaj trajtoj inter ili.

LA PIKARDA LINGVO-AREO

La ĉi-kuna mapo montras la teritorion, kie oni parolas la pikardan lingvon. Ĝi ampleksas la francajn departementojn Somme, Oise, Aisne (ambaŭ lastaj sen ilia suda duono), Pas-de-Calais, Nord (sen la flandralingvaj arondismentoj de Duinkerke/Dunkerque (2) kaj Hazebroeck/Hazebrouck) kaj la belgan provincon Henegovio (sen ĝia orienta zono). Montriĝas, do, ke la pikarda lingvo-areo estas konsiderinde pli vasta ol la franca administra regiono "Pikardio" (kiu entenas nur la departementojn Somme, Oise kaj Aisne). Pri tio ne kulpas, kiel ofte, iu stulta administra decido: Efektive la regiono tradicie konsiderata kaj konsideranta sin pikarda okupas nur proksimume la sudan duonon de la tuta lingvo-areo. El tio fontas ke la cetero de la lingva regiono havas neniun memkonscion pri sia identeco, pri kio ni reparolos sube.

IAM FLORINTA LINGVO

En la mezepoko, la pikarda estis tre grava kaj prestiĝa literatura lingvo, eĉ multe pli grava ol la franca mem. Tamen necesas iom korekti tion pro parazita fenomeno: Jam en la 12-a/13-a jarcentoj la franca havis grandan prestiĝon kiel reĝa lingvo, tiel ke la t.n. pikardaj tekstoj de tiu periodo neniam estis pure pikard-lingvaj, sed ĉiam verkitaj en miksaĵo de pikarda kaj franca, en variaj proporcioj. Tiu fakto ebligis al postaj kleruloj deklari ke ili estas franc-lingvaj kun kelkaj "dialektismoj" ... Kompreneble, oni povas aserti male ke ili estas pikard-lingvaj kun kelkaj "francismoj". Entute, do, la debato pri "kiulingveco" de la mezepokaj tekstoj ne havas sencon. Restas tamen, ke multaj mezepokaj ĉefverkoj entenas ne malmulte da pikardaĵoj. Mi citu la verkojn de Jehan Bodel kaj Adan de la Hale (3), la "kantfabelon" ("cantefavle") "Aucassin et Nicolete", la duonmitologiajn kronikojn de Felipe Mousket, ktp. Ili estas kelkfoje pli facile legeblaj de pikard-lingvano ol de klera franclingvano...

La pikarda estis uzata ankaŭ por administrado, justico kaj ĉiuj aspektoj de la publika vivo. Estas klare konstateble en tiamaj tekstoj ke ekzistis forta konscio pri la pikardeco de la tuta lingva regiono. La fama jur-libro "Le livre roisin" en Lile/Lille mencias ke oni devas antaŭ la urbestraro "paroli en la pikarda" aŭ, se oni ne scipovas ĝin, "en la lingvo kiun oni plej bone regas" (la moroj konsiderinde maldemokratiiĝis depost tiam!). En la pariza universitato ekzistis "pikarda nacio" ("nacio" tiam signifis simple "samlingvanaro"), kiu kunigis ĉiujn studentojn kaj profesorojn el la pikard-lingva regiono. - La unua skriba atesto pri la ekzisto de la lingvo estas la fama "Sekvenco de sankta Eŭlalio" verkita en la

9-a jarcento; ĝi estas miksaĵo de latino, ĝeneralaj oil-formoj kaj pikardismoj.

DE LA MEZEPOKA LITERATURILO AL LA MODERNA ‹PATŬAO›

Ekde la 15-a jarcento, kiel ĉie en la fortiĝanta franca ŝtato, la lokaj lingvoj malaperas el la administraj kaj literaturaj tekstoj. Sekvas bone konata procezo, kiu faligas ilin ĝis la stato de "patŭao" (4), sen iu ajn oficiala statuto kaj eĉ konsiderata de siaj parolantoj kiel forĵetenda balasto.

La nuna situacio estas kompleksa:

Kiel mi jam menciis, ne ekzistas konscio pri la lingva kaj kultura unueco de la tuta lingvo-areo. Nur la tri sudaj departementoj agnoskas sin pikardaj, dum la du aliaj (Nord kaj Pas-de-Calais) perdis ĉian memkonscion. Tiu dissplitiĝo verŝajne fontas el la periodo, kiam nur la suda parto apartenis al la franca ŝtato, dum la nordo estis hispana-nederlanda. La 19-a-jarcenta industriigo koncernis precipe la nordon kaj provokis rapidan dekadencon de la tradicia civilizacio, dum la sudo restis pli agrikultura. Nun tiu dueco ankoraŭ pligraviĝas, ĉar la sudo estas ekonomie turnata al Parizo, kaj la nordo al la urbego Lile/Lille.

La lingvo estas parolata de pli kaj pli malmultnombraj homoj, precipe en la kamparo kaj precipe de maljunuloj. En la urboj ĝi ege franciĝis kaj kelkloke pluvivas nur sub la formo de kelkaj vortoj aŭ sintaksaj formoj en ĝenerale franca lingvaĵo. Ekzistas esceptoj: Kelkaj regionoj konservis lingvon pli puran, pli vivan, eĉ ĉe junuloj.

En tiu panoramo mi preterlasis la belgan parton de la lingvo-areo, la provincon Henegovio, ĉar ĝi prezentas apartan situacion. Tie nun forte renaskiĝas pikarda konscio, dank' al la strebado de grupo da junaj poetoj kaj kantistoj (aparte menciindas la Henegovia Komitato por Pikarda Aktivado, CHAPIC), ankaŭ dank' al la laboro de la dialekta sekcio de la Kulturdomo de Torné/Tournai. Nun ĉiuj enloĝantoj de la regiono konscias ke ili estas pikardoj kaj ne valonoj. Tiu pozitiva evoluo estis verŝajne favorita pro la fakto ke tiu regiono estas ekonomie subevoluinta kompare kun la cetera Valonio kaj Flandrio: Difini sin pikardo estas maniero protesti kontraŭ tiu situacio.

KAJ MORGAŬ?

Pikard(ist)a movado, ankoraŭ malforta, naskiĝis, kaj ĝi ne povas neplukreski. Ĝis antaŭ kelkaj jaroj ekskluzive kultura (kaj eĉ "universitateca"), ĝi nun eniris la vojon al politikiĝo. Signo de tiu evoluo estis la naskiĝo, antaŭ du jaroj, de Somera Popola Pikarda Universitato, kiu ĉiujare organizas dutagan sesion (en Maru/Maroeuil apud Aro/Arras en 1978, kaj en Cvocan/Quevaucamps en Belgio, en 1979).

La celo estas pritrakti en altnivelaj (kaj franclingvaj) kursoj la vivon de la regiono kaj de la pikarda kulturo. Tamen montriĝis ke la vortoj "popola" kaj "universitato" estas malfacile agordeblaj, kaj tiu iniciato tuŝis nur malmultnombran (iom pli ol cent) eliton ... plejparte ne-pikardlingvan!

Nova iniciato estos la lanĉo de regiona gazeto redaktota parte en la pikarda. Ĝi provos pritrakti aktualajn temojn tra la prismo de regionismo kaj servi kiel ligilo inter ĉiuj pikardoj.

Nun la ĉefa tasko, kiu kuŝas antaŭ la pikardaj aktivuloj, estas renaskigi pikardan konscion en la regiono Nord/Pas-de-Calais kiu etendiĝas inter la du jam konsciigitaj regionoj Pikardio kaj Henegovio. Por tiu celo la "nouviële canchon" (nova kanzono) povas esti trafa armilo. Nur kiam la tuta regiono estos retrovinta sian identecon kaj unuecan konscion eblos starigi

fundamentajn demandojn: Kiun statuson doni al la pikarda lingvo? Ĉu reunuigi la belgan kaj francan partojn de la regiono? Kiun lokon la pikarda regiono havu en morgaŭa Eŭropo?

Jen specimeno de pikardaj lingvo kaj moderna literaturo:

'T sieu lé solèl èsqu'al nwi
---

jéon.ne min
al pèque 'd in.ne sécwa 'd vré
més san quèrtin pou ti 'l warder

ti 't sieu lé solèl èsqu'al nwi
lé ronche i canpte léz invie

lé batante ouvère sul orache
conme in.ne guéhole san carnarin
ète dira lé nmin san mintir

De: Paul Mahieu (Torné/Tournai),
el: "i va vnir in oziéo".

France:

Tu suis les soleils jusqu'à la nuit
---

jeune main
à la pêche de quelque chose de vrai
mais sans panier pour le garder

toi, tu suis les soleils jusqu'à la nuit
les ronces font exploser les envies

les volets ouverts sur l'orage
comme une cage sans canaris
tu diras les lendemains sans mentir

Vi sekvas la sunojn ĝis la nokto
---

juna mano
fiŝkapte serĉanta ion veran
sed sen korbo por konservi ĝin

vi sekvas la sunojn ĝis la nokto
la rubusoj eksplodigas la dezirojn

la ŝutroj malfermitaj al la fulmotondro
kvazaŭ kaĝo sen kanario
vi diros la morgaŭojn senmensoge

(Daŭrigo el la dekstra kolumno:)

- Tipaj diftongoj: "jéon.ne, soléo, man.ye" (pr.: jeo̯n, soleo̯, mãj).

Paul Mahieu estas unu el la plej interesaj poetoj verkantaj en la pikarda. Li estas ankaŭ respondeculo de la dialekta sekcio de la Kulturdomo de Torné/Tournai.

Lia teksto enhavas kelkajn francismojn:

- lé (france: les) anstataŭ ché;
- solèl (france: soleil) anstataŭ soléo;
- min (france: main) anstataŭ man.ye;
- orache (france: orage) anstataŭ hèrnu;
- nmin (france: demain) anstataŭ nman.ye aŭ dman.ye.

Tiu mallonga teksto prezentas kelkajn tipajn originalajn trajtojn de la pikarda lingvo:

- Konservo de la "k"-sono de la latina "ca": lat. "pisca" - pik. "pèque" (prononcu: pek) - france "pêche" (pr.: peŝ).

- Konservo de la ĝermandevena "w" (pr.: ŭ): ĝerm. "*wardôn" (komparu la germanan "warten") - pik. "warder" (pr.: ŭarde) - fr. "garder" (pr.: garde).

- Evoluigo (palataligo) de la latinaj "ce, ci" al "ché, chi" (pr.: se̯, ŝi): lat. "rumice(m)" - pik. "ronche" (pr.: rõŝ) - fr. "ronce" (pr.: rõs).

- Evoluigo de la latinida grupo "en" al "in" (pr.: ẽ), dum ĝi rezultas france "en" (pr.: ã): lat. "mentiri/mentire" - pik. "mintir" (pr.: mẽtir) - fr. "mentir" (pr.: mãtir).

- Influo de la ĝermana: "in.ne sécwa" (pr.: ẽn sekŭa) kiel germane "eine Sache".

- Multaj nazaj vokaloj: pik. "jéon.ne, in.ne, conme" (pr.: jẽõn, ẽn, kõm) - fr. "jeune, une, comme" (pr.: jõn, ün, kom).

Notoj (koncerne la artikolon "Ignorata etno: la pikardoj")

(1) Pli precize, en Valonio, sen ĝia okcidenta parto, kiu estas pikardlingva.
Necesas bone precizigi tiun starpunkton, kiu rekte kontraŭas la kutimajn opiniojn pri Belgio: La franca lingvo en Valonio estas ekstera, imperiisma lingvo, la lokaj lingvoj estas la valona kaj la pikarda. Antaŭ nelonge studo montris ke komence de la 2o-a jarcento 9o % de la vilaĝ-konsilantaroj laboris en tiuj lokaj lingvoj. Nun aperas movado en Valonio kiu celas anstataŭigi la francan per la valona kaj la pikarda kiel oficialaj lingvoj.

(2) La nefrancaj loknomoj estas prezentataj ĉi tie sub iliaj formoj indiĝena kaj franca.

(3) Lia nomo estis francigita: Adam de la Halle.

(4) Mi kuraĝas enkonduki tiun neologismon, surbaze de la franca "patois", kiu entenas fortan aĉ-nuancon male al la vorto "dialecte" kiu celas esti pli-malpli objektiva.

Alain Dawson, Aro/Arras



MALFRUA VENKO: LABORKONTRAKTO *EN* LA GROENLANDA

La legantoj de ETNISMO certe memoras nian koncizan raporton pri la laborkonflikto en la plumbo- kaj zinkominejo "Nigra Anĝelo" de Marmorilik, 5oo km norde de Holsteinborg, en Groenlando. (Vidu numeron 18 de 22. o3. 1978, p. 2.)

El intertraktadoj kun la dana entreprenista organizo nun rezultis, ke kelkaj el la postuloj de la groenlanda laborista organizo GAS estas plenumitaj.

La dana entreprenista organizo rezignis pri la postulo ke oni faru ĝeneralan reguladon por tuta Groenlando antaŭ ol fari kontrakton pri la laborkondiĉoj en la minejo en Marmorilik, kio signifus plian prokraston kaj fortiron de la afero el la manoj de la koncernataj dungitoj. Grava venko estas ke oni sukcesis ke la laborkontrakto inter la groenlandaj laboristoj kaj la dana entrepreno (en Groenlando!) estos skribita en la lingvo de la lando: en la groenlanda. Parto de la laboristoj forpelitaj sekve de la striko en 1977 (!), inter kiuj estas la konfidenculo de la laboristoj strikintaj, Hans Løvstrøm, estis redungita de la entrepreno.

Tiuj atingoj signifas tamen nur partan venkon super fremdula aroganteco kaj misuzo de ekonomia potenco. Gravas ankaŭ la atingo de plia memkonscio pri propra valoro kaj potenco flanke de la groenlandanoj.

La aŭtonomion, kiun Groenlando ĝuas depost la 1-a de majo 1979, la enloĝantoj, kutimiĝintaj al okcidentstilaj demokratiaj procedoj pere de la danaj balotoj ktp., tuj firme ekregis mem. (Komparu ETNISMO-n 22, p. 15.) Ne solvita ankoraŭ estas la ekonomia bazo. Obstaklas precipe la problemo de suvereneco pri la propra grundo kaj ties ekspluatado. Pri tiu punkto la danoj rezervis al si veto-rajton ...

Dirk Willkommen

AĈEOJ

MORTIGEJOJ EN PARAGVAJO

(Daŭrigo el n-ro 23)

Pro tio ke la API petegis min ĉiel ajn peni por peti indianan terparton, mi trovis min , kvankam nevole, paroli pacige. Mi diris al ili ke tio kion mi vidis pri indiana vivmaniero dum mia mallonga vizito en Paragvajo ne estas tiel malbona kiel mi atendis, kvankam estus gravas distordo, se mi ne dirus ke kien ajn mi iris mi trovis indianojn suferantajn kaj mortantajn. Ne, mi ne vidis homĉasadon kontraŭ indianoj - ja plibonigo flanke de la paragvaja regosistemo - sed mi vidis multajn evidentiĝojn de indiana sklaveco. La respondo al tiu ĉi deklaro estis malgaja silento, kiun sekvis pasiaj atakoj flanke de generaloj kaj adjutantoj kontraŭ la kunlaborantoj pri la libro kaj kontraŭ mi.

Generalo Bejarano rapide subtenis la takson de generalo González pri mi: ke mi estas sekreta komunisto. Frapegante la tablon per la pugno por emfazo, li kriis ke la pretendo pri genocido en Paragvajo estas "mensogo, komunista mensogo, diabla mensogo". Liaj kunlaborantoj civile kaj uniforme vestitaj kapjesis kaj aspektis dece koleregaj. Plie, daŭrigis generalo Bejarano, fingromontrante al mi, mi evitis ĉiun okazon renkonti lin malgraŭ la multaj petoj kiujn li faris al la usona ambasadejo. Li estis preta de la komenco klarigi al mi la malsuprecon kaj sovaĝecon de la indianoj. Antaŭnelonga ekzemplo estis atako de 11-jara indiana sovaĝulo al blankhaŭtulino por kiu la indianeto laboris en Asunción. "Nun," diris la generalo, "mi iros kun vi al la ĉefsidejo de mia organizo, kie vi havos nenian ajn dubon pri ekzistantaj realecoj." Generalo Bejarano ekstaris akompanate de siaj civilaj lakeoj kaj diversaj armeaj adjutantoj. Mi restis sidanta kaj respondis ke mi ne iros ien ajn krom al la usona ambasadejo kie oni atendas min kaj poste al la flughaveno por trafi la flugmaŝinon reen al Usono en la posttagmezo. "Vi diris," respondis generalo Bejarano, "ke paragvajanoj estas murdistoj." "Ne," mi diris, "mi estimas paragvajanojn kiel inter la plej ĉarmaj homoj kiujn mi iam ajn renkontis." Generalo González ekdiris: "Via pardonpeto estas tro malfrua. Vi, kiel gasto de la paragvaja registaro, malpurigis ĝian honoron." Mi respondis ke prizorgo flanke de la paragvaja registaro pri la indiana enloĝantaro povus esti facile esprimita per ĉesigo de la sklaveco. Mi precipe raportis renkontiĝon kun kvar indianoj kiuj sklaviĝis nur du semajnojn antaŭ nia renkontiĝo, kaj aldonis: "Kie estis la proceso kontraŭ la sklavigantoj?" Sed ne estis eĉ nur ondeto de interesiĝo pri tiu ĉi temo, por ne paroli pri farado de notoj kiam mi proponis doni la nomojn de la sklavigantoj al la armeaj kaj civilaj sinjoroj kiuj persistis subteni sian honoron.

Ekstarante por foriri mi ne sciis, ĉu mi foriros sola aŭ helpe de armita eskorto al la enket-sekcio. Sed je mia surprizo estis rutinaj manpremoj. Oni diris al mi, en severaj militistaj tonoj, ke mi informu la amerikan publikon ke la paragvaja registaro amas siajn indianojn kaj pro tio ĝi persistas relokigi ilin, kaj plie, ke oni atendos mian raporton en Paragvajo kaj ke oni studos ĝin nepre kun atento.

Se la celo de mia vojaĝo al Paragvajo estis konvinki min pri tio ke la stato de la indiana vivmaniero pliboniĝis pro ia ajn kialo, ĝi ne estis sukceso. Mia vidpunkto pri indiana vivmaniero en Paragvajo estas, fakte, multe pli pesimista post kiam mi venis kaj vidis, kaj la fakto ke oni severe gardis min - vastaj areoj de Paragvajo estis malpermesitaj al mi - tute ne helpis. Mi traktu miajn konstatojn dum la vojaĝo laŭ ordo de ilia

graveco.

La libro priskribis homĉasadojn kontraŭ la aĉeoj. Ĉu mi vidis homĉasojn? Ne. Tamen, mi ja vidis postvivantojn de la homĉasadoj efektivigitaj, interalie, fare de la malbonfama homĉasanto, murdisto kaj sklavigisto Manuel Jesús Pereira. La postvivantoj, kiujn mi vidis, estis ĉe la "Colonia Nacional Guayaki". Kiel jam dirite, ili faris plenajn kaj sangajn raportojn pri sia kaptiĝo kaj translokiĝo fare de Pereira. Ili montris la cikatrojn sur la korpoj faritaj de hakiloj, kaj ili parolis pri tiuj kiuj neniam leviĝis post homĉasado kaj pri tiuj kiujn oni transportis tre malproksimen per la veturiloj de la blankhaŭtuloj. La paragvajaj oficialuloj ne intervjuis la atestantojn por akiri ilian eldiron en tribunalo. Oni lasis ilin por putriĝo. Same pri ilia atestaĵo. Al atestantoj kiuj provis interkonsentite atesti pri la masakroj kaj pri la identeco de la krimfarintoj, antaŭ paragvajaj aŭtoritatuloj, oni minacis per morto. Kelkajn oni laŭlitere fortimigis de la usona ambasadejo por ke tia informo ne atingu Vaŝingtonon. Ne estas indiko ke la Eksterlanda Fako intervenis en la turmentado de individuoj kiuj celis komunikiĝi kun nia registaro. Deklaroj flanke de kredindaj informintoj pretendis ke "Pac-Korpusaj" volontuloj almenaŭ en unu antaŭnelonga afero ja provis malebligi al informonto kontakti la usonan ambasadejon.

Estas vere ke la Pereira-regado super la "Colonia Nacional" formale finiĝis ĉirkaŭ 1973. Pereira, tamen, ricevis permeson ekloĝi en propra plantejo, kaj oni servadas al li aĉe-indianojn. La bieno estas nun malfermita al ĉiuj vizitantoj, sed mi elektis ne vidi ĝin. Estas klare, tamen, ke Pereira maljuniĝas en la komforto de duonemeritiĝo kaj ke la paragvaja registaro ne kulpigas lin baze de la atestaĵo de amas-buĉado, turmentegado kaj sklavigo, kiuj estas ja evidentaj. Ekzistas onidiroj ke li raportas al la ministro de defendo kiel konsilanto pri indianaj aferoj - eĉ se generalo González forte deklaras ke Pereira tute rompis ĉiujn ligojn kun la paragvaja armeo.

Mi intervjuis aĉe-indianon - ekster la rezervejo - pri homĉasado. Kaj li diris al mi, kun la kulture kondiĉita rideto por eviti aflikti aŭskultantojn, kiel li kaj grupo de 30 aĉeoj, kantante ĉirkaŭ fajro kiun ili konstruis en ĝangala arbaro, estis atakitaj de blankhaŭtuloj (en manovro evidente zorgeme planita) kaj faligitaj ĉiuflanke de pafiloj. Preskaŭ ĉiuj estis mortigitaj, inkluzive de la edzino de mia informanto. Ili aŭdis pri homĉasadoj antaŭe, sed provis ne kredi tion. Tiunokte li kaj lia aro da indianoj subite troviĝis ĉirkaŭitaj de blankhaŭtuloj kiuj pafadis al ili. Kun voĉo konstante senesprima, kun vizaĝo konstante ridetanta, li klarigis kiamaniere li forkuris. Li portis unu el siaj infanoj kun si dum li forkuris tra la arbaro.

Dum li parolis, la senesprimeco de lia voĉo kelkafoje sonis kiel subrido, kelkafoje kiel histeria rido. Ĉiam, tamen, liaj okuloj respegulis konstantan malĝojon kaj rezignacion, malofte vidiĝis eĉ nur lumeto de apelacio al liaj aŭskultantoj. Ĉu li raportis tiun ĉi masakron al la aŭtoritatuloj? Lia respondo havis la paciencon de plenkreskulo kiu respondas al demando de infano, sed por la unua fojo la senesprimeco en lia tono estis malfacile regata. "Estintus treege danĝere," li respondis pere de tradukisto.

Ĉu la indianoj de Paragvajo estas sklavigitaj? Mi intervjuis membron de la paragvaja burokrataro (mi ne identigu lin) kiu raportis ke usona Novaj-Triboj-misiisto, nomita Robert, akiris 300 indianajn sklavojn en 1975. Ĉi tiuj sklavoj laboris por li en fora parto de la norda Ĉako. Kaj alia informanto, indiano, diris al mi ke posedanto de grandbieno, José Dolores Pereira, partoprenis en homĉasadoj. Li nun havas junan indianan sklavinon kaj rifuzas resendi ŝin al ŝia familio malgraŭ ĉiuj petegoj. Li loĝas proksimume 9 km for de la indiana kolonio de Laurel.

(El: AKWESASNE NOTES, printempo 1978; tradukis: Roan U. Orloff-Stone; daŭrigota en ETNISMO 25.)

* * * * * * * * * * *

Ande Gaup (maldekstre) kaj Mikkal Eira (dekstre), reprezentantoj de la intersamea agadgrupo, dum gazetar-konferenco.

KONTRAŬ SAMEOJ: ELEKTRO AŬ BOACOJ?

Enviindaj tiuj landoj kiuj havas tiom da "pura" energio en siaj montoj kaj riveroj ke ili povas produkti la plejmulton de la necesa energio per eluzo de la falanta akvo! Sed trompas la unua vido. En Svedio, kiu produktas pli ol 7o % de la elektro per siaj riveroj, sed havas preskaŭ neniun karbon kaj petrolon, la demando de nuklea energio minacis faligi registaron. Sed ankaŭ akvo-energio ne estas senproblema. Fortaj grupoj protestas kontraŭ la detruado de la naturo per la grandegaj akvo-rezervejoj, kiuj dronigas, kune kun la libere fluantaj riveroj, ampleksegajn areojn da praa naturo ĝis nun uzata "nur" de la gregoj de vagantaj boacoj. Kion multaj ne scias, estas la fakto ke tiuj boacoj ne estas bestoj sovaĝe vivantaj, sed posedaĵo de anoj de popolo kiu jam de jarmiloj vivas en tiu ĉi lando. Pli ĝuste: Ili iam posedis la tutan teritorion de norda Skandinavio, kaj la regionoj kie ili nun vivas estas iliaj lastaj rifuĝejoj, kiujn oni lasis al ili post kiam ili estis forpelitaj de la pli fekundaj regionoj de sia teritorio. Se oni forprenas de ili tiujn lastajn regionojn, tiel diras iliaj reprezentantoj, tiam oni neniigas ilin kiel popolon.

Spite al tio ke la koncernaj ŝtatoj Svedio kaj Norvegio garantiis al ili la estadon en la plej malfekundaj regionoj, nun minacas la lasta bato kontraŭ la ekzisto de la sameoj kiel etna kaj kultura unuo. Juraj procesoj ne helpis kontraŭ la pli fortaj socioj. Nur restas obstaklado de ĉiuj minacaj aktivecoj aŭ morto kiel popolo kaj cedo al asimiliĝo en la skandi-



naviajn sociojn, kun la detruaj konsekvencoj kiujn tio havas por la individuoj.

La registaro de Norvegio planas konstrui akvo-rezervejon, kun centralo, en la centro de la vivregiono de la sameoj, la regiono de la rivero Alta. La samea urbo Masi estus tute subakvigita. Vojkonstruado kun pli intensigita trafiko, la bruo de la pezaj konstrumaŝinoj barus al ĉirkaŭ 3o.ooo ĝis 4o.ooo boacoj gravan spacon por paŝtado, kie ili ankaŭ naskas siajn idojn. La altigitaj temperaturoj pere de la grandega akvo-rezervejo vaporigus sufiĉe da akvo dum la vintro por kaŭzi glacian surfacon sur la neĝo malebligante al la boacoj elfosi la raran vintran manĝaĵon. Spertoj en Svedio tion pruvas.

Sameaj aktivistoj nur tre malfrue kaj pli-malpli hazarde eksciis pri la konkreta komenco de la laboroj kaj tuj organizis baradon de la vojoj por la ŝargaŭtomobiloj, kiuj venis por komenci la prepar-laborojn. Norvegaj policanoj forportis kaj registris la sidstrikantojn kiuj rezignis je uzo de perforto. Eskalado minacis. Tiam junaj sameoj sub gvido de Mikkal Eira decidis alian taktikon por atingi prokraston kaj juran traktadon de la afero kaj por veki la publikan opinion.

Ili vojaĝis la longan vojon suden al la ĉefurbo kaj konstruis tendaron rekte antaŭ la norvega parlamentejo kaj komencis fasti. Precipe grava estas por ili, kiuj neas uzi aktivan perforton, la vekado kaj atentigo de la publika opinio en kaj ekster la lando. Tiu taktiko precipe tial ne estas sensanca, ĉar la skandinaviaj landoj tre akcentas al la ekstero la prestiĝon kiel demokratiaj, toleremaj kaj homamaj ŝtatoj. Mikkal Eira sukcesis per intertraktado ke la registaro promesis prokraston de la laboroj en la Alta-regiono je ses semajnoj kaj traktadon en la parlamento. La sameaj reprezentantoj tion taksas granda venko. Ili tamen ne endormiĝis, sed uzas la tempon por fari informan kaj helposerĉan vojaĝon tra la skandinaviaj landoj por aktivigi la opinion kaj organizi helpon, ankaŭ por akiri tre bezonatan monan subtenon. Ilian inform-vojaĝon finance subtenis "International Work Group for Indigenous Affairs" ("Internacia Labor-Grupo por Indiĝenaj Aferoj"; ĉefsidejo: Kopenhago, Danlando), kiu sin okupas pri tiaj problemoj mondskale kaj kiu estas, cetere, subtenata de la norvega ministerio pri <u>eksterlandaj</u> aferoj.

Por interesatoj jen la adreso kaj kontonumero de tiu ĉi organizo:

INTERNATIONAL WORK GROUP FOR INDIGENOUS AFFAIRS

Frederiksholms Kanal 4 A, KØBENHAVN K, Danlando,

Postgiro 4179900, celo de la pago: "mărket Samerne".

(Foto kaj mapo "pruntitaj" el la dana taggazeto "Information", 26.1o.79.)

Dirk Willkommen



VENETOJ

"Ła nathiòn veneta, dapò de 35oo (tremiłethincoethento) ani de autogoerno e de łibartà, dapò de'l orgàn Napoleòn, ła ga cognosest el goerno co'l pèjo ma dhusto e kiłibrà de i Ostria e 113 ani de indhustithia, fracór, viołenthe e robament talgiani. I Talgiani i ne ga faxést strusiàr e patìr ła fan co stéore e robarìe besciałi, i ne ga portà kive tre olte de pì soldài e carbuniéri ke no fa i Ostriaci, i ga faxést scanpàr dhenerathiòn de Veneti te ła Frantha, łe Merike, ła Ostralia ethetra, i ne ga donà do goare mundiałi e antre de pì cèe, el Vajont, lejòn de mistri talgiani ke i ne fa renegàr i nustri veci, ła nostra thoca e ła nostra łengoa; i ne ga sconto ła nostra storia e i xe ncora drio a strucarne.

Ancói a cogne dirghe 'AO!"

(El enkonduka teksto okaze de internacia kunveno en Conejàn/Conegliano, 2o./23. o9. 1979.)

La veneta lingvo estas parolata en la sep provincoj de la regiono Venetio kaj krome en diversaj zonoj de la ĉirkaŭaj provincoj de Mantova, Trento, Pordenone, Udine, Gorizia kaj Trieste, same kiel en kelkaj lokoj de Istrio kaj Dalmatio (Jugoslavio).

La "Veneta Filologia Socieo" (Via Onso Partecipazio, 1, Lido di Venezia, Italio), aliĝinta al la "ASOCIO INTERNACIA POR LA DEFENDO DE LA MINACATAJ LINGVOJ KAJ KULTUROJ" (AIDMLK), klarigas en itallingva broŝureto la historian fonon de la veneta lingvo. (Franco Rocheta, "La lingua veneta", 1978, 7 paĝoj) - Tie oni legas ke la veneta lingvo estas latinida, evoluinta sur la bazo de la antikva veneta lingvo kiu ekzistis jam pli ol 1.5oo jarojn antaŭ nia erao. La veneta lingvo estas unu el la fontoj de la malfrue naskita latina lingvo, kaj tio kompreneblas se oni konscias pri la fakto ke venetoj el centra Eŭropo migris en plej diversajn regionojn, kion pruvas aro da arkeologiaĵoj.

Dum grandaj partoj de la Mezepoko kaj la Moderna Epoko, la Veneta Respubliko ludis elstaran rolon en la politika kaj ekonomia historio, kaj tiam la veneta lingvo estis la oficiala lingvo de tiu regno.

En la pasintaj du jarcentoj, la influo de la "itala" lingvo pli kaj pli fortiĝis kaj parte difektis la lingvan personecon de la veneta. Tamen, la Veneta Filologia Socieo asertas ke nuntempe tiun ĉi lingvon parolas, en la kamparo kaj en urboj, la plej granda parto de la enlogantoj, kaj la VFS mencias kiel nombron 5 milionojn da venet-lingvanoj. Laŭdire konstateblas kreskanta mem-konscio de la veneta etno.

* * * * * * * * * * *

Ciganoj postulas agnoskon!

La 27-an de oktobro 1979 la prezidentino de la Eŭropa Parlamento, Simone Veil, partoprenis, kun 2.ooo personoj - inter ili ciganoj el 1o eŭropaj ŝtatoj -, manifestacion en la iama koncentrejo Bergen-Belsen (inter Hamburgo kaj Hanovro, FRG) memore pri la 5oo.ooo ciganoj murditaj dum la nazia teroro. Simone Veil, kiu estis mem enkarcerigita en Bergen-Belsen, kaj pluraj reprezentantoj de ciganaj organizoj, de registaroj kaj aliaj institucioj same kiel de la ĉeforganizanto, "Societo por Minacataj Popoloj" (SMP), alparolis la ĉeestantojn. La eĥo en la amaskomunikiloj estis tre ampleksa.

Ne estis ĉiam tiel. Dum tri jardekoj post la fino de la nazia reĝimo en FR Germanio oni ĝenerale neadis agnoski la evidentan fakton de genocido praktikita fare de la nazia ŝtato kontraŭ la ciganoj, kaj la plej alta tribunalo de FRG eĉ deklaris la paŝojn de la Hitler-registaro kontraŭ la ciganoj "krim- kaj spionad-preventaj", do legitimaj, laŭleĝaj, tiel ke la postvivantoj ne povu postuli kompensojn (kiajn FRG pagis al Izraelio)! - Ankoraŭ kutimas la malpermeso por ciganoj uzi kampadejojn en FRG. La ĝenerala sinteno de la socio germana restas rifuza, malbonveniga koncerne ciganojn. La municipaj oficistoj kiuj forpelas anojn de tiu ĉi etno el la lokaj terenoj supozeble esprimas nur la publikan opinion. Eventuale raportoj en televido, radio kaj gazetaro pri ciganaj problemoj kaj la tre

interesa "Muzika Festivalo por Ciganoj", la 13-an/14-an de oktobro 1979 en Darmstadt, FRG, kune kun diversaj publikaj elpaŝoj precipe de SMP, povos efiki longtempe por konsciigi la socion pri historia, kultura kaj socia problemo.

Bedaŭrinde, la situacio de la ciganoj en aliaj ŝtatoj ne esence diferencas al tiu en FRG. Grattan Puxon, ĝenerala sekretario de la Tutmonda Cigana Kongreso (TCK), en artikolo publicita en "pogrom", n-ro 61 (marto-aprilo 1979), p. 5 - 8, skizas la situacion en orienta kaj okcidenta Eŭropo: La ciganoj estis forpelitaj, antaŭ proksimume 1.ooo jaroj, el sia hejmregiono Pangabo (Pakistano/Hindio), migris tra Proksima Oriento, la Balkana duoninsulo kaj norda Afriko ĝis centra kaj norda Eŭropo, kie ili aperis en la 15-a jarcento kaj suferis, ekde la 16-a jc., persekutadon, kvankam ili estis starigintaj urbetojn en Grekio kaj aliaj regionoj de la Balkana duoninsulo. Ili esence vivis nomade en la eŭropa socio, kaj tio signifas ke ili restis ĉiam ĉe ties plej malsupra rando. La kulmino de la malaprezado kaj persekutado estis la menciita murdado de duona miliono da ciganoj en la hitlera regno. - Nuntempe, en la socialismaj ŝtatoj - escepte de Jugoslavio - la ciganoj estas ĝenerale neglektataj, kaj nur ege malmultaj sukcesas leviĝi al socia agnosko: En Bulgario, ekzemple, inter 441.ooo ciganoj ĉiujare nur 4o atingas universitatan maturecon; nur proksimume kvarono de ĉiuj ciganaj infanoj frekventis lernejojn (en 1962); en Rumanio, kun 65o.ooo ciganoj, la senlaboreco inter tiuj ĉi estas grandega, kaj se ili havas laboron, ili - kiel antaŭ la milito - estas ŝupurigistoj kaj stratbalaistoj; en Hungario nur en 1974 la ŝtato permesis la fondon de ciganaj organizoj. Jugoslavio diferencas, kiel en multaj punktoj, ankaŭ rilate ciganojn: Tie vivas la plej granda grupo da eŭropaj ciganoj - 7oo.ooo, kiuj disponas pri multaj organizoj, aranĝas tutŝtatajn kongresojn kaj planas eldonadon de propra gazeto, starigon de cigan-lingvaj radio- kaj televidoprogramoj kaj, fine, enkondukon de la cigana lingvo en la lernejojn. Plej gravas por la jugoslaviaj ciganoj akiri la agnoskon kiel "nacia grupo". Ili jam plimultas ol la turkoj kaj madjaroj (o,11 respektive o,468 milionoj) kaj havas "super" si nur la makedonojn kaj albanojn (1,18 respektive 1,3 milionoj). Tamen, konkludas Puxon (kiu vivas en Skopje, Makedonio, Jugoslavio), "se la situacio estas ne kontentiga en la socialismaj ŝtatoj, ĝi estas katastrofa alialoke." Nur Nederlando, certagrade, esceptas: Tie oni komencis instali reton de ruldom-parkejoj kaj specialaj lernejoj por ciganoj.

Ĉiam denove aperas la sama stumbligaĵo: la lingvo. Laŭ artikolo de "Frankfurter Rundschau" de o5. 11. 1979, en Hungario ŝajnas ke oni eksperimentas multe por integrigi la ciganojn en la modernan socion. Testoj montris ke ses- ĝis sep-jara cigano kutime estas sur la nivelo de tri-jara hungara infano, sed ... oni ekkonis baldaŭ ke tiu rezultoj trompis, ĉar tutsimple la ciganeto ne kapablis esprimi sin madjare! Do, tre konata situacio: Iu homgrupo restas ĉe la marĝeno de la socio, ĉar tiu ĉi ne akceptas aliajn vivregulojn ol la proprajn; akceptu la "fremdulo" tiujn ĉi vivkonceptojn aŭ pluvegetu! Se laŭ la cigana viv-ideo ne gravas ĉu homo scipovas legi kaj skribi, ne surprizas ke grandega proporcio de ciganoj estas analfabetoj kiuj ne aparte insistas pri la frekventado de lernejoj fare de la infanoj. Se ciganoj, grandparte, emas sekvi la popolan tradicion de nomada vivo, la "kulture altrangaj" eŭropanoj trafe farus se ili klopodus akcepti tiun aliecon.

Probable estas ne nura kuriozaĵo ke en Hispanio, kie vivas inter o,1 kaj o,3 milionoj da ciganoj, en 1979 estis tradukita al la cigana lingvo la famega "Cigana Romancaro" fare de Ataúlfo Granada, ciganiginta andaluzo, kaj ke oni estas tradukanta la hispanan konstitucion de 1978 en la ciganan lingvon, tiel substrekante ke la ciganoj postulas agnoskon de sia samrajteco kultura kaj politika en la hispana socio.

* * * * * * * * * * * * *

KONCIZE EL.....

BOZEN. En Sudtirolo ankaŭ komence de decembro 1979 eksplodis bomboj, kaj baldaŭ poste iu ĝis tiam nekonata "Unuiĝo por Protekto de la Italoj" rekomendis en flugfolio: "Donu la monon al la viktimoj de la tertremoj de Friulo, kaj ne al tiuj kiuj uzas ĝin kontraŭ ni!" Ĉu, do, 260.000 germanlingvuloj subpremas la 135.000 ital-lingvulojn en tiu provinco? Ne, sed ... Evidentas ke la plej forta partio "Südtiroler Volkspartei" (Sudtirola Popol-Partio, SPP), sub sia estro kaj provinc-reganto depost 19 (!) jaroj Silvio Magnago, ne speciale akcelas la harmonian kunvivadon de ambaŭ etnoj (fakte de la tri samregionaj etnoj: ladinoj romanĉ-lingvaj ofte estas forgesataj far eksteruloj): Italaj infanoj ne rajtas lerni la germanan lingvon jam en infanvartejo aŭ unuaj elementaj klasoj; lerneja interŝanĝo estas rifuzita; unu sama organizo kun membroj en ambaŭ etnoj aranĝis sian pentekostan kongreson dise, laŭ la lingvaneco; la sekci-estro pri lernejaj aferoj klarege prononcas sian moton: "Ju pli klare ni disiĝas, des pli bone ni interkompreniĝos. Miks-kulturo naskos nur malfeliĉon!" Laŭdire Magnago tute ne kontraŭas tian apartec-politikon ... La malamo-plena rigardo de kvazaŭ-armeaj pafistaj kaj tradiciflegaj kluboj direkte al la verd-blank-ruĝa flago kaj la prefero de fanatikuloj de la Dante-lingvo pri repelo de la "barbaroj" trans la Brenner-pasejon garantias sufiĉe longtempe spac-abonon en la amaskomunikiloj por ne ĝojigaj informoj el Sudtirolo.

HAJFO. Antaŭ nelonge estis fondita la "Asocio por la Studo de Judaj Lingvoj" kies celoj estas: (1) kuraĝigi la esploradon de ĉiuj aspektoj de la ena kaj ekstera lingvohistorio de la juda popolo kaj rilataj grupoj, kaj (2) faciligi la interŝanĝon de informoj pri la parolado kaj skribado de judoj kaj de rilataj grupoj per eldonaĵoj kaj kongresoj. La unua numero de la "Revuo de Judaj Lingvoj" ("Jewish Language Review") estu publikigita fine de 1980. Komence de 1981 oni antaŭvidas la eldonon de "Elekta Bibliografio de Jidaj Literaturaj kaj Lingvistikaj Periodaĵoj". Almenaŭ nuntempe la kontribuoj al la RJL devas esti anglalingvaj, kaj oni preferas lingvistikajn temojn, sed kontribuoj pri literaturaj, folkloraj aŭ kulturaj temoj kun forte lingvistika aliro ankaŭ estas bonvenaj. - La Asocio organizas la judan sekcion de la Dua Internacia Konferenco pri Ĝenerla kaj Juda Leksikografio, okazonta en la Delaware-Universitato, Newark, Usono, de la 25-a ĝis la 28-a de aŭgusto 1980. La membrokotizo de la Asocio (inkluzive de la RJL-abono) estas 5,-- usdolaroj. ("Association for the Study of Jewish Languages", 161o Eshkol Tower, University of Haifa, HAIFA 31 999, Izraelio.)

DURANGO. Dimanĉon, la 8-an de junio 1980, proksimume 30.000 personoj libervole pagis "voj-imposton" kaj multakaze eĉ aldonis krompagon. Tiel estis kolektitaj pli ol 10 milionoj da pesetoj (proksimume 260.000 gm/ng), el kiuj 80 % estas destinitaj al la financado de la ekzistantaj kaj instalado de novaj "ikastoloj" (eŭsker-lingvaj lernejoj) en la Durango-distrikto (2.000 infanoj), dum po 10 % ricevis la "ikastolo"-Asocio de la provinco Biskajo kaj la "ikastolo"-Asocio de Nord-Eŭskadio. La "Marŝadon 80" (eŭskere: "Ibilaldia 80") partoprenis, certe ankaŭ alloge por multaj aliaj personoj, pluraj futbalistoj, remistoj, biciklistoj, politikistoj, reprezentantoj de la Vaska Lingvo-Akademio kaj aliaj kulturaktivuloj. Por ĉiu el la kvin kilometroj de la vojo inter Durango kaj Abadiano oni devis pagi libervolan sumeton. Survoje oni babilis, glutis jen kaj jen (pagendan) glaseton da vino, eksidis ripoze (sed kontraŭ pago) sur la tero, manĝis, ĉion ĉi favore al la prosperigo de la aŭtentika etna lingvo.

MILANO. En majo 1980 aperis la unua numero de presita, 12-paĝa, A-4-formata revuo "etnie". La artikoloj, ĉiuj itallingvaj, traktas i.a. Ĵurason, ladinojn, Katalunion, Martiniko, Venetio. Responsas: Tavo Burat.

GORA EUSKADI!
VISCA CATALUNYA!

Katalunio kaj Vaskio povas komenci. Ili atingis la starto-punkton, pli ol kvar jarojn post la morto de la diktatoro Francisko Franko. Ekde 1977 respektive 1978 ambaŭ regionoj havis provizorajn registarojn ... sen aŭtentikaj kompetentecoj kaj sen aparta parlamenta bazo. - La 25-an de oktobro 1979 okazis en tiuj ĉi plej gravaj regionoj de la hispana ŝtato referendumoj pri aŭtonomio-statutoj, kaj 40 % de la voĉdonrajtantoj ne partoprenis en la decido. Tamen la projektoj estis akceptitaj per klara absoluta plimulto de la voĉdonrajtantoj. - La 9-an de marto 1980 la vaskoj elektis la 60 membrojn de sia u n u a parlamento, kaj la 20-an de la sama monato estis elektitaj la 135 membroj de la kataluna parlamento. (Detalojn vi trovos en la sekvanta paĝo.) - Intertempe ambaŭ parlamentoj "naskis" sian respektivan registaron.

Ĉu malgraŭ ĉio ĉi eblas diri ke katalunoj kaj vaskoj atingis nur la starto-punkton de sia propra politika vojo? Certe jes, ĉar ĉio ĉi ne estas pli ol la kadro en kiu koviĝos la regionaj leĝoj per kiuj oni regos sin mem!

Sub la "Arbo de Gerniko", la ĉefa simbolo de la vaska libereco, foto-pozas eminentaj reprezentantoj de la Vaska Naciista Partio (VNP), de maldekstre:

Manuel de IRUJO, eksministro pri justico en la vaska registaro;

Carlos GARAIKOETXEA, la prezidento de la nuna vaska registaro;

Jesús María LEIZAOLA, eksprezidento de la ekzila vaska registaro;

Julio JAUREGUI, eksdeputito kaj nuntempe senatano.

Tiel balotis la vaskoj, tamen nur tiuj de la tri "malgrandaj" provincoj:

provinco	VNP/PNV	PU/HB	HLSP/ PSOE	ME/EE	UDC/UCD	KPH/PCE	PA/AP
Alavo							
179.844	31.64o	14.8o4	14.696	9.659	2o.616	3.172	5.974
1o6.136	31,5 %	14,72%	13,7 %	8,45%	19,71%	2,91%	4,78%
	7	3	3	2	4	-	1
Biskajo							
884.417	2o7.369	85.o64	74.749	4o.268	34.74o	24.863	29.9oo
524.514	39,53%	16,21%	14,25%	7,67%	6,62%	4,74%	5,7o%
	9	4	3	1	1	1	1
Gipusko							
52o.316	111.274	52.294	41.o99	4o.137	22.954	9.o16	7.979
3o1.475	37,23%	17,49%	13,75%	13,43%	7,68%	3,o1%	2,66%
	9	4	3	3	1	-	-
Eŭskadio							
1.584.577	35o.283	152.162	13o.543	9o.o64	78.31o	37.o51	43.853
932.125	37,57%	16,32%	14 %	9,66%	8,4 %	3,97%	4,7 %
6o	25	11	9	6	6	1	2

Kompare kun la tuthispaniaj elektoj de deputitoj, de la 1-a de marto 1979, la diversaj partioj nun GAJNIS (+) respektive PERDIS (-) jenajn nombrojn da voĉoj:

+ 74.991 + 2.527 - 59.692 + 9.967 - 9o.297 - 8.842 + 9.647

(Klarigoj: La unua nombro sub la regiono-nomo indikas la voĉdonrajtantojn, la dua la voĉdonintojn; sub la procentaĵo estas indikita la nombro da seĝoj akiritaj en la parlamento de Eŭskadio; la reston ĝis 1oo % dividas inter si naŭ pliaj partioj, ekzemple la karlistoj, trockistoj, maoistoj, falangistoj ktp., el kiuj neniu eniris la parlamenton.)

Ĉar laŭ artikolo 26 (1) de la aŭtonomio-statuto por Eŭskadio, ĉiu el la tri Historiaj Teritorioj (provincoj) elektas saman nombron da deputitoj, rezultas la grandega diferenco inter la nombroj da civitanoj kiujn reprezentas po unu deputito. Tiel, ekzemple, UDC/UCD en Alavo bezonis nur 2o.616 voĉojn por okupi 4 seĝojn, dum la sama partio en Biskajo akiris per 34.74o voĉoj nur unu solan seĝon. Kompare al la tre industriigita Biskajo, la ĉefe agrikultura Alavo kaj ankaŭ la ne tute same industriigita Gipusko estas tro forte reprezentataj en la parlamento.

VNP EKSTIRAS - SOLA - EŬSKADION

La 31-an de marto 198o, la unua libere elektita parlamento de Eŭskadio kunvenis en la tradici-ŝarĝita "Ĵurdomo", apud la "Arbo de Gerniko", sub prezidado de la plej aĝa deputito ĉeestanta, Jesús María Leizaola, kiu ĝis antaŭ mallonge ankoraŭ estris la pli simbolan ol realan ekzilan registaron de Eŭskadio, evoluinta el la unua provizora registaro de 1936, kiun malpli ol jaron post ĝia enoficiĝo forpelis la Franko-ribeluloj. El la supre menciitaj frakcioj malĉeestis la inaŭguran ceremonion (kaj ĉiujn ĝisnunajn kunsidojn) la Popol-Unueco/Herri Batasuna kiu konsideras la nunan aŭtonomion falsa, trudita de "Madrido" kaj direktita kontraŭ la libereco de la vaska popolo. - La parlamento elektis kiel prezidanton la VNP-deputiton Juan José Pujana kaj kiel vic-prezidantojn Inmaculada Boneta (VNP) kaj

José Antonio Aguiriano (HLSP, t.e. Hispana Laborista Socialista Partio), kiel sekretariojn José Antonio Zaldúa (VNP) kaj José Luis Lizundia (ME, t.e. Maldekstro de Eŭskadio). La deputitoj tuj ekdiskutis eksterordinare "gravan" aferon: Ĉu uzi la literon "z" aŭ "s" por skribi "Eu?kadi". Rezultis ke ĝenerale oni akceptis la "s". Tamen, niaj legantoj ne tro ridu pri tiu diskuto: La "z" - kiun defendas kaj uzadas VNP - havas profundan ideologian fonon, ĉar la parti-fondinto Sabino Arana Goiri (1865 - 1903) derivis "euzk-" el "eguzki" (t.e. "suno"), kaj li klarigis tiun derivon per la sun-kulto de siaj antaŭuloj. - La tutan kunsidon akompanis - ekster la kunvenejo - manifestacio postulanta "Enkarcerigitoj al la strato!" kaj "Amnestio - nun!"

La 9-an de aprilo 1980 la vaska parlamento rekunvenis, ĉi-foje por elekti la ĉefministron, la prezidenton de la vaska registaro. La sola kandidato faris sian program-paroladon: 12 minutojn en la eŭskera, 68 minutojn en la kastilia. Garaikoetxea insistis precipe pri jenaj aspektoj:

- Navaro, konsistiga parto de Vaskio, des pli emos aliĝi al la Aŭtonoma Komunumo de Eŭskadio ju pli modela tiu ĉi prezentos sin.
- Neniam estos akceptebla kia ajn supernacia strukturo politika kiu neniigus la vaskan nacion.
- La socio devos transformiĝi en la senco de pli da egaleco, kaj la registaro nepre diskutos la opiniojn de la plej diversaj sociaj grupoj.
- La centra registaro en Madrido farus fatalan eraron bremsante la evoluon de la aŭtonomio, ĉar tiel la registaro pravigus tiujn kiuj jam nun neas la pozitivecon de la aŭtonomio-statuto.
- Apartan dediĉon postulas la ekstreme malfavora ekonomia situacio: Mankas privataj investoj, kaj la senlaboreco atingis 17,46 % (sen kalkuli la kaŝitan senlaborecon). Unu el la plej efikaj rimedoj proponitaj de Garaikoetxea estas publika investado. La laboristoj devos multe pli ol ĝis nun kundecidi pri la sorto de la entreprenoj, kiuj - en la manoj de privatuloj - havas grandegan socian responson.
- La vaska popolo, pli ol iam, estas kulture dividita: diferencaj kulturaj enhavoj kaj diferencaj esprimiloj. Vaskio travivas, eventuale, la plej gravan kulturan krizon de sia ekzisto, ĉar temas pri divideteco ne nur inter la generacioj, sed ankaŭ pri tiu inter samgeneracianoj eŭskeraj kaj ne-eŭskeraj. Sen trudo, la registaro klopodu laŭeble altagrade du-lingvigi la enloĝantaron kaj tiucele investos konsiderindajn financajn rimedojn, i.a. en la instruadon. La publikaj funkciuloj en du-lingvaj regionoj devos iom post iom akiri sufiĉajn sciojn en ambaŭ lingvoj. Ankaŭ la universitatoj estas evoluigendaj kiel servojn al la vaska socio.
- Kiel premison de la paciĝo Garaikoetxea postulis garantiojn por la aŭtentikeco de la aŭtonomio tiel nuligante la dubon de tiuj kiuj imagas ke nenio ŝanĝiĝos.

La frakcioj disponis pri 90 minutoj por prepari siajn respondojn, kiuj rezultis jen tre suprajaj, jen akraj, sed unuanimaj en unu sola punkto: la rifuzo voĉdoni por Garaikoetxea kiel tria "lehendakari" (laŭlitere: unua ŝarĝito) de Eŭskadio, post José Antonio Aguirre kaj Jesús María Leizaola. Fakte, en la unua voĉdono la kandidato malsukcesis: 23 jesoj - 23 neoj - 3 nevalidaj. La dua voĉdono portis al li, la 1o-an de aprilo 1980, je la 00.01 horo la venkon: 25 jesoj (ĉiuj de VNP) kontraŭ 24 neoj (HLSP, ME, Komunista Partio de Hispanio, Popol-Alianco, Unio de Demokrata Centro). Tiel la neĉeesto de Popol-Unueco kaŭzis la absolutan plimulton de la doni-

La vaska ekzemplo klaregigas ke la klasika divido de la parlamento en "dekstron" kaj "maldekstron", eventuale kun "centro", ne trafas, ĉar la ĉefa ideologia limo apartigas la ekskluzive vaskajn partioj disde la regionaj organizoj de tut-hispaniaj partioj:

PU	ME	VNP		KPH	HLSP	UDC	PA
11	6	25		1	9	6	2
	sume: 42				sume: 18		

Laŭ la tradicia divido estus jene:

PU	ME	KPH	HLSP		VNP	UDC	PA
11	6	1	9		25	6	2
	sume: 27				sume: 33		

Tamen, la fakta divido estas tute alia:

VNP	ME	UDC	HLSP	KPH	PA
25	6	6	9	1	2
sume: 25			sume: 24		

(Atentu la malĉeeston de 11 PU-homoj!)

taj voĉoj favore al VNP, kiu reprezentas tamen nur 22 % de la voĉdonrajtantoj!

La 29-an de aprilo 198o la 13 ministroj de la registaro de Eŭskadio ĵuris, antaŭ Garaikoetxea, "fidele kaj lojale plenumi la devojn de sia ofico laŭ la leĝo kaj serve al Eŭskadio". Ĉiuj registaranoj estas VNP-homoj.

La ministro pri kulturo, Ramón Labayen, substrekis ke "se malaperas la eŭskera lingvo, malaperos ankaŭ la vaska popolo, kaj ni ne emas malaperi".

Intertempe, la registaro de Eŭskadio decidis ke la sidejo de la administracio estos Gasteiz/Vitoria dum ..... Navaro ankoraŭ ne estas aliĝinta.

ANKAŬ EN KATALUNIO: NACIISTA VENKO

provinco	KkU/CiU	HLSP/PSOE	USPK/PSUC	UDC/UCD	RMK/ERC	SPA/PSA
Barcelono	572.465	487.396	437.627	171.816	174.6o4	63.7o5
3.362.847(*)	26,28%	23 %	2o,6 %	8,18%	8,29%	3,o1%
2.o41.236	26	22	2o	7	8	2
Ĝirono	84.5o1	44.735	21.248	34.482	24.3o1	2.992
336.298	37,11%	19,64%	7,33%	15,14%	1o.67%	1,31%
228.941	7	4	1	3	2	-
Ljejdo	45.162	3o.812	16.969	37.4o5	19.563	1.o62
265.o83	28,23%	19,26%	1o,6 %	23,38%	12,23%	o,66%
16o.662	5	3	1	4	2	-
Taragono	52.768	45.9o1	33.762	44.2o1	23.3o3	4.327
379.475	23,41%	2o,52%	15,o9%	19,76%	1o,41%	1,93%
225.36o	5	4	3	4	2	-
Katalunio	754.896	6o8.844	5o9.6o6	287.9o4	241.771	72.o86
4.343.7o3	28 %	23 %	19 %	11 %	9 %	3 %
2.658.921	43	33	25	18	14	2

Klarigoj: La sistemo egalas tiun uzitan en la prezento de la rezultoj de la vaskaj balotoj. KkU - Konvergo kaj Unio, USPK - Unuiĝinta Socialista Partio de Katalunio, RMK - Respublikana Maldekstro de Katalunio, SPA - Socialista Partio de Andaluzio. (*) - La nombroj de voĉdonrajtantoj kaj voĉdonintoj kaj la procentaĵoj koncerne Barcelonon estas je 1,22 % sub la definitiva, kio ne influis la sego-disdonon.

La balotoj por la kataluna parlamento enhavis du grandajn surprizojn: Unue, la socialistoj perdis la relativan plimulton favore al "Konvergo kaj Unio", kaj, due, la andaluzaj socialistoj sukcesis havi du parlamentajn segojn en "eksterlando". Oni eventuale rajtas ja konkludi ke la "tradiciaj" socialistoj de HLSP (kaj la komunistoj), en Katalunio same kiel en Vaskio kaj simile al Andaluzio, ricevis kvitancilon pri sia generale ne sufiĉe klara sinteno koncerne aŭtonomion, kaj ke la multegaj andaluzaj laboristoj en Katalunio ne sentas sin trafe reprezentataj fare de la aliaj partioj.

La 1o-an de aprilo 198o la kataluna parlamento elektis kiel sian prezidenton Heribert Barrera, de Respublikana Maldekstro de Katalunio. (Barrera estas la Teritoria Sekretario de AIDMLK por Hispanio.)

La 22-an de aprilo 198o, Jordi PUJOL, la gvidanto de "Konvergo kaj Unio" kaj sola kandidato por la ĉefministreco parlamente prezentis sian registaran laborprogramon. Pujol (en la foto) donis forte naciisman akcenton al sia parolado, listigis tutan aron da fundamentaj legoj decidendaj fare de la kataluna parlamento kaj emfazis ke estos prioritata celo de la registaro defendi tion kio karakterizas Katalunion: gian lingvon, gian kulturon. Tiucele li anoncis legon kiu normaligos la uzadon de la kataluna lingvo, tradukadon de filmoj en la katalunan, centron por eksteren-projekciado de la kataluna kulturo kaj projekton de katalunlingva televido. La gisnuna televido estas, laŭ Pujol, malnaciiga elemento. La kandidato insistis pri la lingva unueco de la kvar nuntempaj provincoj de (la malgranda) Katalunio, la Valencia Lando kaj la Balearaj Insuloj anoncante ke la "Generalitat" (t.e. la organiza sistemo de la Aŭtonoma Komunumo de Katalunio) havos, por defendi la katalunan lingvon ankaŭ en la aliaj Aŭtonomaj Komunumoj menciitaj, tiun funkcion kiun havas la hispana lingvo-akademio koncerne la kastilian lingvon tra la mondo. Pujol diris ke en la kampo de ekonomio preskaŭ ĉiuj paŝoj kiuj povus alporti rapidajn solvojn ne estas entrepreneblaj de la kataluna registaro. - En la voĉdono Pujol rezultis - kiel oni atendis - ne elektita: Nur liaj propraj 43 frakcianoj voĉdonis por li. Tamen, la 24-an de aprilo 198o, el la 135 deputitoj nur 59 voĉdonis kontraŭ li (HLSP, USPK kaj SPA), tiel ke Jordi Pujol estis elektita la 115-a prezidento de Katalunio. La nova ĉefministro nomis sian politikan linion "maldekstra-centra" kaj promesis altegagrade eviti parti-politikan gvidadon de la lando. Intertempe Pujol estas, fare de la rego, eknomita kaj, fare de sia antaŭulo Josep Tarradellas, enoficigita.

Etnismo *Informilo pri etnaj problemoj*

Eldonas kaj redaktas: Uwe Joachim MORITZ, Feldstr. 38, D-519o Stolberg (FRG), tel.: (49-24o2) 72336, poŝtgirkonto: 232612-3o6 Hannover.

ETNISMO aperas 3 fojojn jare. Tiu ĉi estas la unua numero de 198o.

Jarabono (kalendara jaro): 8,-- gm (aŭ 1o internaciaj respondkuponoj).

Nepre NE sendu ĉekojn sen antaŭa interkonsento! Evitu BANKAJN girojn el eksterlando, ĉar mia banko kutime subtrahas konsiderindan parton el la girajo/ĉeksumo kaj ..... ETNISMO plialtigas sian deficiton!